

Lasta leterkesto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 marto 26 & 28

Cl.- Karaj geaŭdantoj. Parolas Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ per lasta leterkesta elsendo ni adiaŭas niajn geaŭdantojn. Kiel ni rakontis la pasintan semajnon, Svisa Radio Internacia ĉesos elsendi en esperanto pro drastaj financaj problemoj. Vi aŭdas hodiaŭ nian lastan elsendon. Sed SRI intencas organizi kasedoservon en esperanto, se de radio-elsendejoj, de esperanto-societoj kaj de individuaj mendoj esprimiĝos sufiĉe multe da intereso por tiu projekto. Ĉiuj interesatoj do nepre skribu al Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando, petante informojn pri la antaŭvidita kasedoservo en esperanto.

A.- Kaj nun per lasta leterkesto peronda ni adiaŭas la geaŭdantojn, kies skribaĵojn ni ricevis post nia novjara leterkesto. Tiun salutadon, kiun ni komencis la pasintan semajnon ni okazigas laŭ la alfabeto ordo de la landoj.

Cl.- En Finnlando nin regule aŭskultas Esa LANG en Lahti.

A.- El Francio venis pluraj mesaĝoj. Saluton al Jean CALAMY en Aubagne, al Jean-Claude CHARBONNIER en Sauvigny les Bois, al (miŝel dartiĝ) Michel DARTIGE en Rennes, al René DEBERNARDI en Nice, al Françoise DONNÉ en Douai, al Jacques DONY en La Ricamarie, al Pierre GOFRIEN en Nyons. Pluraj el tiuj geaŭdantoj petis la alsendon de la kasedo pri la svisa neŭtraleco, kiun ni komencis pretigi. En ĝi ni reaŭdigos kvin elsendojn pri la disvolviĝo de la svisa nocio pri neŭtraleco kaj du novajn prelegojn, kiujn ni nuntempe pretigas. Ĉiuj petintoj de tiu kasedo pri la svisa neŭtraleco ricevos informojn, kiam ĝi eldoniĝos.

Cl.- Ankoraŭ en Francio ni diras adiaŭan saluton al Jean-Jacques NOËL en Mer, kiu sendis 2 mesaĝojn kaj al Alain PIERRE en Monsegur.

A.- El Germanio ni ankaŭ ricevis multajn aŭdmesaĝojn. Dankon kaj saluton al E. J. GRIMLEY EVANS en Dudweiler kaj al Otto KACZINSKI en Hafelberg, kiun ni citas:

Cl.- "Sekvante vian alvokon antaŭ kelkaj semajnoj pri helpo al la blindaj geesperantistoj per parolitaj libroj mi sendas unue sampoŝte 2 sonkasedojn (sume unu kaj duona horo) al vi kun peto al plua transdonado, ĉar mi ne havas la precizan adreson, mi opinias, ke estis en Hispanio. La deziratan tekston de Piĉ mi ne havas, tamen mi estas konvinkita, ke "Judoj sen mono" de Michael Gold ankaŭ ĝojigos nian ankoraŭ nekonatan amikon. Post kvitanco kaj kontentigo de adresato mi sendos la restaĵon (sume 6 kasedojn = 210 paĝojn)..." Grandan dankon ni diras al tiuj helpemuloj. Do 5 geaŭdantoj esprimis ĝis nun sian intencon registri librojn. Pro troa laboro ni ne povis finorganizi tiun agadon ĝis nun, sed tre baldaŭ ni kontaktos perletere ĉiujn, kiuj sin proponis, kaj la agado povos ekstarti.

A.- Ĉiam en Germanio adiaŭan saluton ni diras al Karl-Heinz KERSTING en Essen, al Rokuro MAKABE en Frankfurt am Main, al Fritz Walter POPPECK en Oberkirch, al Ludwig RÖLL en Günzburg, kiu sendis 23 aŭdraportojn.

Cl.- Saluton al Erich SEIDEMANN en Dresden kaj al Rudolf SKORUPPA en Bad Wörlshofen, kiu skribis: "Tre interesa estis la gramatika pritrakto de "po", afero esence de multaj nekonata."

A.- Saluton al Joh. WINDISCH en Singen.

Cl.- Kaj nun ni rigardu al Hispanio, kie ni adiaŭas kun Luis BLASCO en Zaragosa, José L. CRUZ, kiu skribis el Tenerife, unu el la Kanariaj Insuloj, kaj kun Rafael RUIZ CRIADO en Badalona.

A.- En Islando saluton al Simone KARL SIGURDSSON en Reykjavik.

Cl.- Kaj en Italio saluton al Marco GIOVANNONI en Lastra a Signa, al Luisa MADELLA en Parma, kiu sendis 2 mesaĝojn.

A.- En Japanio saluton al (Toŝijuki Manabe) Tashiyuki Manabe en Hokkaido.

Cl.- kaj en Kanado al Jean A. SOREL en Montréal Québec, kiu skribis:

A.- "Pli kaj pli interesaj estas viaj elsendtemoj. Ĉar mi estas blinda, la kaseda versio estus pli utila por mi."

Cl.- En Kubo saluton ni diras al Alberto GARCIA FUMERO en Playa,

A.- kaj en Latvio al Saulcerite NEILANDE en Riga.

Cl.-Malajzio nin aŭskiutas (ĈAN Suk Ŭaj) CHAN sook Wai en Kuala Lumpur

A.- kaj en Nederlando Miny MASSAR en Alkmaar kaj Mila van der HORST-KOLINSKA en Den Haag. Ŝi sendis 3 mesaĝojn kaj skribis: "Mi ĵus aŭdis vian dissendon dum kiu vi kuraĝis denove publike nomi lingvofuŝulon. Montriĝas, ke ne sufiĉas varbi por Esperanto, sed ankaŭ poste defendi ĝin de esperantistoj, ĉu? Tamen mi vere ĝojas ke vi tion faras, ĉar via forto estas multe pli granda kaj influa ol ekzemple mia, kiam mi skribe reagis al Esperanto-redakcioj pri ne ĝusta uzo de la lingvo en iliaj revuoj."

Cl.- Kaj Mila van der HORST-KOLINSKA sendas fotokopion de artikolo aperinta en "La Revuo Orienta" kaj titolita "Simpozio: Enkonduko de Esperanto en Publikan Brodkaston." Kaj koncerne la nunan influon de la angla lingvo al esperanto ŝi interese raportas. Ni citas ŝin:

A.- "Vi eĉ ne povas imagi ĝis kioma grado ĉinoj kaj japanoj estas angligitaj. Dum oktobro-novembro 1991-a staĝis ĉe Internacia Esperanto-Instituto por studi Cseh-metodon kaj gvidadon de Cseh-seminarioj en Azio, ĉina instruistino de lingvoj rusa, angla kaj Esperanta en ĉina Altlernejo de Tradicia ĉina medicino en Nanchang. Kvankam ŝi bone konis Esperanton teorie, tamen en la praktiko ŝi faris erarojn angle-devenajn. Ŝia argumento estis, 'ĉar en la angla...' Aŭdante tion kelkfoje mi vere nervoziĝis, sed samtempe mi konsciiĝis kiom danĝera fariĝas la angla por esperanto en tiuj landoj. Daŭris preskaŭ du monatoj ĝis kiam mi sukcesis forigi de ŝi tiun anglan influon. Fin-fine ŝi komprenis la diferencon inter ambaŭ lingvoj, do mi estas trankvila, ke ŝi ne instruos malbone aŭ erare, tamen daŭris tre longe.

Cl.- Ni longe citis tiun leteron de Mila van der Horst-Kolinska, ĉar ĝi tuŝas gravajn punktojn. Unue oni bone konsciu, ke antaŭ kvindek da jaroj ne la angla tiel influis esperanton, sed la franca, kaj ke pro tio oni nun diras en esperanto: radio-elsendojn, kvankam la vortelemento "radio" havis tute alian signifon: "la radioj de la suno ludis inter ĝiaj folioj; la luno similis al pala disko sen radioj" por citi frazojn de Zamenhof. Kaj sen tro zorgi pri tiu signifo de la vortelemento "radio", la franclingvanoj trudis al ĝi novan signifon: tiu de peronda elsendejo. Kaj ĉar tiam ĉiuj estis sub la franca influo, neniuj kontraŭstaris. Estas eble bone, ke nun iuj sentigas pere de anglismo, ke oni povus uzi alian vortelementon kia "brodkasto". Tio eble foje kondukos la esperantoparolantojn emancipiĝi tute konscie el la franca kaj angla influoj. La lingvo, kiu plej influas nin estas la fremda lingvo, kiun ni plej intensive studis. Tre verŝajne tiu ĉina profesoro dediĉis multajn jarojn al la elstudo de la angla, dum kontraŭe nur kelkajn semajnojn al tiu de esperanto. Estas do tute normale, ke ŝi vidas esperanton tra la angla filtro. Kaj montriĝis, ke almenaŭ du monatoj estis al ŝi necesaj, por ke ŝi povu rigardi memstare al esperanto. Per interlingvaj influoj ĉiuj lingvoj evoluas al pli granda internacieco, kiu estas ĉefe semantika. Tio signifas, ke eĉ se lingvo konservas tre apartajn vortformojn, ĝi emas iom post iom konformiĝi la signifon de tiuj vortoj al tiuj, kiujn paralelaj vortoj havas en la aliaj ĉeflingvoj. Tio multe pli influas la semantikon de esperanto, ol ni imagas. Vortoj perdas sian originalan signifon favore al pli internacia signifaro. Tio fine ne havas nur negativajn rezultojn. Pro tiuj semantikaj influoj la tradukado de unu lingvo al alia plifaciliĝas. Tio ne signifas, ke ni devas ne rezisti al tiuj influoj. Ni devas konscie uzi la lingvon kaj iri mezvojon duone akcepteman, duone rezisteman.

A.- En Pollando ni diras saluton al Piotr CYMERMAN en Lipnica, al Maciej WNUK en Varsovio kaj al Henryk ZYGOWSKI en Tuchova.

Cl.- De Ruslando ni ricevis afablajn novjarajn bondezirojn de la anoj de Esperanto-Klubo "LARO" en Soĉi. En tiu urbo okazis fine de la jaro kongreso kun reprezentantoj el 54 urboj, entute 123 esperantistoj el tuta Rusujo. Fondiĝis Rusia Esperantista Unio surbaze de Sovetrespublikara Esperantista Unio. Ni esperas viglan sukceson al tiu nova esperanto-asocio.

A.- Kaj ni turnu niajn rigardojn al Sudafriko: Esperanto-Klubo- Surmonteta en la Universitato de Cape Town sendis al ni la unuan numeron de sia esperanto-organo "Babilemilo". Ankaŭ sukceson al tiu esperanto-klubo.

Cl.- En Svedio saluton al Henrik KARLSSON en Kisa, en Svislando al Werner SCHAUFELBERGER en Zurich, en Uzbekistano al Miĥail PUŜKAREVSKIĤ en Dĵizak.

A.- Kaj nun al Usono, kie ni diras adiaŭan saluton al James M. BOGGS en Salinas, Kalifornio, al David COWELL en Tucson, al Diakono John KOWALKOWSKI en la ortodoksa monaĥejo de la Sankta Patrino de Dio - la Vivodonanta Fontano en Woodstock Valley. Li ludas akordionon kaj multe plaĉas al li la svisa muziko, kiu ĝenerale sekvas niajn esperanto-elsendojn.

Cl.- Ĉiam en Usono saluton al (Ĝan Liĥti) Jon LIECHTY en Bloomington, al Cornelius J. McKOWN en State College.

A.- Kaj nun, karaj geaŭdantoj, kun iom da emocio, ni kore salutas vin. La estonteco de la esperanto-aktiveco de Svisa Radio Internacia certe dependas de la nombro de la alfluonta korespondado. Ni esperas, ke la projekto pri esperanta kasedo-servo interesos multajn, kaj tiel

ni ree, per alia maniero, vizitos vin regule pere de esperanto-prelegoj kaj ankaŭ leterkestaj babiladoj.

Cl.- Claude kaj Andrée GACOND salutas vin plej kore.

1992 MARTO :
DEFINITIVA ĈESO DE LA
ESPERANTO-LINGVAJ
ELSENDOJ DE SVISA RADIO INTERNACIA
